I Enköping har sedan sistlidne november pågått en esperantokurs med redaktör Morariu som lärare. I kursen ha deltagit 61 elever. Att ett så stort antal kan annoteras bland de hittills av esperantobacillen obesmittade Enköpingsborna, får helt skrivas på gesin-joroj Holmströms konto, vilka bedrivit en energisk propaganda för denna kurs.

dig höll den sista lektionen med sina elever, i närvaro av bl. a. Svenska Esperantoinstitutets respresentanter, rektor S. Jansson och redaktör P. Nylén, vilka uttalade sin stora belåtenhet med det resultat, som uppnåtts.

Efter lektionen talade överläraren vid Enköpings folkskolor, hr A. Lundin, vilken själv jämte trenne kolleger del-



× Morariu; vid hans sida fru Holmström; andra sidan: red. Nylén, Holmström

Att samtliga elever med stigande intresse följt undervisningen från början till slut får helt skrivas på lärarens konto. Redaktör Morariu med sina livliga gester och humoristiska inlägg har visat sig kunna göra lektionerna till verkliga nöjesstunder. Man hör därför också endast beklaganden från kursdeltagarnas sida att kursen redan är slut.

Kursavslutningen firades med supé å hotell "Gästis", där hr Morariu samti-

tagit i kursen. Hr Lundin uttalade sin stora beundran för Che-metoden och för hr Morarius förmåga och energi att utnyttja densamma. Talaren uttryckte även en förhoppning om att lektioner i esperanto snart måtte komma till stånd i landets folkskolor samt hälsade dem, som voro intresserade för en fortsättningskurs, välkomna till skolan, vars lokaler stode till disposition.

Till sist uttalades å kursdeltagarnas vägnar ett tack till läraren och initia-

tivtagarna till kursen, hr och fru Holmström.

En av de yngsta kursdeltagarna överlämnade å samtliga kursdeltagares vägnar en bukett röda nejlikor samt en gåva till hr Morariu, så överlämnades ock blommor till fru Holmström, som under samtliga lektioner tjänstgjort som tolk.

På detta följde supé, varvid förutom institutets representanter talade stadsfullmäktiges ordförande samt ordf. för platsens A.B.F-avdelning, vilka båda uttalade sig i entusiastiska ordalag om såväl läraren som lärometoden.

Representanter för stadens båda tidningra hade även inbjudits och att döma av referaten i deras respektive tidningar, ha två nya anhängare vunnits för la lingvo internacia. "Enköpings Nyheter" skriver bl. a.: "Om kursen nu blott är ett minne, så är icke esperanto det. Esperanto i Enköping överlever denna korta kurs och många — ja säkerligen de flesta av kursdeltagarna — komma att bygga vidare på den grund, som lagts av redaktör Morariu". — "——— det hör till Svenska Esperantoförbundets stora förtjänst, att det har förmåga att skaffa goda lärare, vilka förstå att på ett utomordentligt sätt fånga de frivilliga åhörarnas öron och blickar".

Som alltid vid angenäma tillfällen här i livet tömmes timglasat alltför fort. Denna erfarenhet, som gjorts under hr Morarius lektioner, blev ännu mera framträdande vid den stämmingsfulla avslutningsfesten, där uppbrottets timme kom alltför snart. Härmed var den första Che-kursen i Enköping avslutad, efterlämnande bland deltagarna ett ljusst minne.

Kursdeltagarna, som nu fortsätta sina studier i trenne cirklar, visa en entusiasm för sin förkovran, som lovar det bästa resultat.

Redaktör Morariu har tidigare på invit av överläraren givit en lektion för en klass i folkskolan. Denna senterades livligt av barnen, som nu få fortsätta med en lektion i veckan, som gives av fru Ebba Holmström.

L a s e k r e t a r i o.

Heby-, Uppsala- och Västerås-kurserna.

Ungefär samtidigt med ovanstående avslutning voro red. Morarius kurser i Uppsala, Västerås och Heby färdiga.

I Uppsala

ägde avslutning rum den 23 febr. med ett samkväm på kvällen, där kursledaren på det hjärtligaste avtackades. En subskriberad gåva överlämnades.

Västerås.

Kursen avslutades tisdagen den 24 februari. De flesta av de 23 deltagarna avlade därvid lägre esperantoeamen. Fem av kursdeltagarna, som även tidigare studerat esperanto, avlade högre examen. Efter examen samlades man på ett konditori, där ett festligt samkväm vidtog. Här blev kursledaren, som på ett alldeles särskilt sätt gjort sig omtyckt av eleverna, avtackad i tal såväl på esperanto som svenska. En subskriberad minnesgåva, åtföljd av en textad adress, samt blommor överlämnades till honom med ett anförande av lokomotivförare O. Dahrné. Efter allt att döma voro såväl kursledaren som eleverna nöjda med de resultat, kursen givit. Hr Morariu undervisar på ett populärt men dock effektivt sätt. Västeråseleverna vilja även på detta sätt bringa honom en hälsning och ett tack.

De ha även beslutat sig för att fortsätta studiet av esperanto. Och för den

skull har Västerås esperantoförening La verda stelo reorganiserats. Och den har redan börjat en fortsättningskurs. En lärosal i högre allmänna läroverket i Västerås har välvilligt upplåtits som kurslokal av rektor S. Landtmanson.

Till styrelse har valts: hr O. Dahrné, ordf.; hr B. A. Thalenius, v. ordf.; fröken Judith Andersson, sekr.; fröken Elsa Thalenius, v. sekr.; hr Emrik Andersson, kassör.

I Heby

hade logen Arken stått för kursen, som avslutades den 1 mars och i vilken deltagit 36 personer. Avslutningen högtidlighölls med ett samkväm på hotell Gästis och omväxlade med musik och sång samt tal. Vid samkvämet meddelades att man ämnade bilda en esperantoklubb. Hrr Norling och Brink från Uppsala bidrogo med uppläsning och sång, och hr Morariu avtäckades av hr Alex Hede, som tolkades till esperanto av hr Holger Ström. En minnesgåva från kursdeltagarna samt blommor överlämnades till Morariu av kursens yngsta, Mary Karlsson.



Billigaste sommarresa

och samtidigt trevligaste är fortfarande med ETK:s Estlandgruppresor. Vill Ni vila Er eller vill Ni få övning i att prata esperanto eller vill Ni komma i trevligt sällskap så far över till Estland! Resan kostar i år endast:

I:a klass 50:— kr.

II:a klass 40:— kr.

III:e klass 30:— kr.

IV:e klass 25:— kr.

Förfrågningar besvaras genom

Esperanta Turista Komisiono,
Heleneborgsgatan 6, Stockholm.

Plenvivo esperantista en Sundsvall.

Interesaj kunvenoj. —
Esp. ekspozicio. — Pähn
en la urbo: sukceso.

La societo "Amika Rondo" en Sundsvall vivas kaj laboras sufiĉe vigele. Post la ordinara somera ripozo la grupo kunvenis la unuan fojon por la sezono jaŭdon la 9an de septembro 1930. Oni diskutis denove la demandojn pri aranĝo de Che-kurso kaj decidis aranĝi tian kurson komenciĝante meze de januaro 1931. Samideano Albin Viklander rakontis pri sia ĉeesto ĉe la internacia kunveno de I.O.G.T. kaj la kunestado kun bontemplanoj-esperantistoj el diversaj landoj. Alia samideano, la instruisto Artur Nore, rakontis pri sia partopreno en la kurso esperanta por instruistoj en Stockholm.

Sabaton la 25an de oktobro la grupo kunvenis por la dua fojo en la nova sezono. La sekretario raportis pri rimarkinda novaĵo de la esperanta literaturo, nome la Andrée-libro, kaj propagandis por ĝi. Okazis interesa programo: Samideano G. Johansson laŭtlegis poemojn de svedaj verkistoj, tradukitajn de li. Inter ili estis poemoj de Karlfeldt, Stjerne, Princo Wilhelm kaj Dan Andersson. Samideano Edvard Björkstrand faris interesegan paroladon pri sia ĉeesto ĉe la XXII-a internacia kongreso en Oxford kaj li montris fotografajojn, kiujn li mem faris dum la kongreso. Fine li transdonis al la grupo donace grandegan kaj belan fotografajon de la kongreso. S-ro Theodor Nilsson el Vattjom faris mallongan paroladon kaj transdonis al la grupo prezidan frapilon kaj jarkolekton de malnova sveda esperantogazeto siatempem aperanta kiel organo de la svedaj esperantistoj tuj post la frakaso

de la malnova S.E.F. post la apero de "Ido". Tiuj objektoj apartenis siatempe al la malnova esperantoklubo en Sundsvall antaŭ 20 jaroj.

La 28an de novembro la grupo kunvenis denove. Samideano Sjögren proponis ke la grupo aranĝu ekspozicion de esperantaĵoj kaj promesis intertrakti kun librovendisto Nygren pri permeso uzi lian grandan elmontran fenestron por tiu celo. La grupo akceptis la proponon kaj elektis kiel komitaton gesamideanojn C. W. Sjögren, Edv. Björkstrand, Gust. Johansson kaj Thelma Gunnarsen. Samideano G. Johansson en la nomo de la redakcio de la grupa gazeto "La Verdulo" raportis, ke la gazeto vendiĝas kun defecito kaj petis eldiron de la grupo, ĉu oni daŭre eldonu ĝin. Okazis diskuto, dum kiu ĉiuj parolantoj esprimis sian ŝaton de la gazeto kaj la deziron, ke ĝi daŭre aperu. Pro tio la grupo decidis aperigi ĝin malgraŭ la defecito. Okazis programo. Samideano G. Johansson diris kelkajn favorajn vortojn pri la novaperinta libro de la rumana verkisto Emil Isac, tradukita de sam. Morariu, kaj laŭtlegis kelkajn belajn specimenojn. Samideano Edv. Björkstrand deklamis "La preĝo sub la verda standardo de Zamenhof. Samideano Sjögren rakontis korespondajn spertojn. Post la kunveno oni iris en la Popolan Domon, kie oni trinkis kafon kaj amuzis sin diversmaniere.

En la nova jaro la unua kunveno okazis la 9an de jan. Sinjoroj Sjögren kaj Johansson raportis pri la aranĝoj por la baldaŭ komenciĝanta Che-kurso, lastenomito legis leteron de fraŭlino Elinjo Pähn kaj la kondiĉaron de la Che-instituto. Oni diskutis la manierojn de la plua propagando por la kurso. Kantigis nova esperanta kanto: Jungman Jansson de Dan Andersson, tradukita esperanten de Gust. Johansson.

Lundon la 19an de jan. alvenis al la urbo fraŭlino Elinjo Pähn por komenci la instruadon. Okazis intervjuoj kun la urbaj gazetoj, kiuj la postan tagon tre favore skribis pri esperanto kaj la instruistino kaj la metodo por la novaj kursoj. En la konservativa gazeto urba, kiu ĉiam moke skribis pri Esperanto aŭ silentis, oni povis tiun tagon legi tre favoran intervjuon dank' al fraŭlino Pähn kaj sinjoro Sjögren, kaj la tagon post la publika provleciono favoran raporton kun esperanta rubriko:

Vespere la 21an okazis la publika provleciono en la ejo de la "Metiista societo". Malgraŭ la epidemio de influenco la salono estis plenplena, pli ol 200 personoj ĉeestis. Fraŭlino Pähn faris mallongan belan paroladon kaj helpe de la publiko agrablan lecionon. Tradukis Gust. Johansson. Post la leciono sin anoncis 35 personoj por la kursoj, sed jam la postan tagon ili estis 45, kaj iom post iom fariĝis cento da partoprenantoj. Ili lernas en du grupoj kun po du lecionoj semajne. Unu grupo havas ĉirkaŭ 65 lernantoj kaj la dua ĉirkaŭ 35. Konsiderante la malfavorajn cirkonstancojn, la influenco-epidemio kaj tiun fakton, ke nia urbo estas malmola kampo por idealistaj laboroj, ni devas taksu tre alte la atingitan nombron. Sed ni streĉis ankaŭ la fortojn kaj propagandis diversmaniere, anoncis en gazetoj, disŝutis en la urbo milojn da afiŝetoj kun la bildo de la instruistino kaj mallongan efikan tekston, irigis sur stratoj knabojn kun grandegaj afiŝoj sur stangoj, kun same allogaj surskriboj, kaj antaŭ ĉio propagandis persone inter gekonatoj. Generale oni povas diri, ke ĉiuj aktivaj anoj de la grupo tre interese, entuziasme kaj unu-sente kunhelpis por la sukceso.

Dimanĉon la 8an de februari fraŭlino Pähn faris paroladon en Gnarp pri Estonujo. La paroladon aranĝis la lo-

ka klubo socialdemokrata. Sinjoro C. W. Sjögren lerte interpretis.

Merkrede la 11an okazis demonstra-
cia provleciono por instruistoj en
Sundsvall. Bedaŭrinde la alvenintaro
estis ne granda. Fraŭlino Pähn faris
belegan paroladon pri Esperanto kaj
la Che-metodo kaj poste tre sukcesan
lecionon. Tradukis lerte Edv. Björk-
strand. Dankis rektoro Hugo Lindmark
kaj post la leciono akompanis fraŭlinon
Pähn kaj la esperantistojn ĉeestantajn
tra la nova bela lernejo, montrante la
ĉambrojn kaj la interesajojn. Post per-
meso de la rektoro fraŭlino Pähn vizi-
tas la lecionojn en la Sundsvall'aj lern-
ejoj studocele. Geji.

— "Estona vespero" estis 15.3 aranĝ-
ita en la Höglundaskolan (la lernejo
de Höglunda) por la partoprenintoj de
la kursoj de fraŭlino Pähn. Ĉeestis ĉ.
100 personoj. Fraŭlino Pähn tre inte-
rese paroladis pri Estonujo, ĝia natu-
ro, popolo kaj moroj. Plue kantado,
muziko, deklamado.



Gekolegoj instruistaj!

Mi sukcesis instigi la "Edukan Ko-
mitaton de la Germana Unuiĝo por li-
go de Nacioj", eldoni la porinfanan ga-
zeton por la 18a de majo (Tago de
Bonvolo) ne nur en angla, franca kaj
aliaj lingvoj, sed ankaŭ en Esperan-
to. La prezo estos 5 germanaj markoj
po 100 ekz. (inkl. de sendkostoj ktp.).
Bonvolu mendi — ankaŭ pro la pro-
pagando de Esperanto en la Ligo de
Nacioj — por viaj gelernantoj kiel
eble plej grandan kvanton da ekzem-
pleroj de ĉi tiu gazeto jam nun ĉe la
sekretariino de "Kunlaborado": f-ino
Martha Moelke, Brandenburgische Str.
5, Berlin-Südende (Germanujo). Poŝt-
ĉekkonto: Berlin 131530.

Dro Dietterle

ano de la "Erziehungsausschuss der
Deutschen Liga für Völkerbund".

Res i sommar!

ETK anordnar i sommar gruppresor
bl. a. till Esperanto-världskongres-
sen i Krakow i Polen. Resan blir alldeles
enastående billig, om man tar hänsyn
till det långa avståndet mellan Sverige
och södra Polen. Passa på tillfället att
billigt besöka en av de intressanta och
roliga esperantokongresserna!

I gruppresa blir priset för III:e
klass endast 75 kr. fram och tillbaka.
I II:a klass 125 kr. och i I:a klass 185
kr. Om man vill åka ensam ordnar
ETK resan i III:e klass för 90 kr., i
II:a klass för 155 kr. och i I:a klass
för 235 kr. Dessa nämnda priser gälla
resor tur och retur Stockholm—Reval
—Riga—Krakow.

För den som önskar resa över Ber-
lin, alltså Stockholm—Berlin—Krakow
och åter, bli priserna: i III:e klass 150
kr., i II:a klass 225 kr. och i I:a klass
385 kr. Om man reser i grupp om 20
personer erhålles 25 % rabatt.

Krakow-kongressen.

Beträffande uppehållet i Krakow un-
des Esperanto-kongressen meddelas, att
logi kan erhållas: på hotell till priser
som varierar mellan 2.50—8.50 kr. pr
dygn, hos privatpersoner till ungefär
2.25 kr. och å studenthem (gemensam-
hetssalar) till mellan 0.90—1.75 kr.

Maten är billig i Krakow. Middags-
måltid t. ex. bräknas till 0.90—1.30 kr.
inkl. dricks.

Anmälningblanketter för deltagande
i kongressen jämte övriga meddelanden
om den kunna erhållas genom Esperan-
ta Turista Komisiono, Heienborgsga-
tan 6, Stockholm.



Libroj kaj gazetoj



Mondhistorio de Hermann Haefker.

Originalo esperanta. Unua en serio de scienca libraro.

H e r m a n n H a e f k e r, Jarmiloj pasas. Unua volumo, 243 paĝoj kun bildoj kaj kartoj. Prezo duonlede bindita gmk. 9.— (por ambaŭ volumoj kune gmk. 16.—). La dua parto aperos en aprilo. Havebla ĉe: Eldona Societo Esperanto, Box 698, Stockholm 1.

Jen novaĵo interesa, kiun anoncis Heroldo samtempe kiam aperis nia epokiga Andréo-libro. Al la energio de Teo Jung ni dankas la kreon de belega, interesoplena libro, kiu baldaŭ eniros la bibliotekon de ĉiu esperantisto. Bela bindaĵo, luksa papero, klara preso, modela aŭ pli bone arta lingvo, kaj prezo modera.

En tre bela antaŭparolo la aŭtoro konfesas sian firman volon utiligi Esperanton por serioza persista batalado por la paco. Edukante homojn per studado de la homara historio al interkompreno, ni atingos novan epokon. Ĉar vidu, spirita batalo ĉiam antaŭiras tian grandan paŝon en la historio, kiun ni nomas epoko.

Konforme kun tiu konfeso, la aŭtoro de "Jarmiloj pasas" ĉefe traktas ne pri okazoj, pri faktoj, pri datoj, sed prefere jetas lumon sur farojn gravajn, kaj serĉas ties motivojn por ke ni lernu per tio, kiel ni agu aŭ ne agu, kaj kien nin pelas malbonaj pasioj.

Jam en la unua ĉapitro li forte akcentas, ke la mondo konsistas el unue izolitaj regnoj kaj gentoj, kiuj per la evoluo iom kontaktiĝis, sed preskaŭ nur ekstere. Nun ili devas spirite trovi unu la alian por kunvivi pace. Por helpi al tia eltrovo, la mondhistorio devas esti supernacia rigardo sur la tutmonda evoluo, ne farita laŭ pensmaniero de certa ŝtatano.

Kion la aŭtoro volas montri, tio estas la leĝoj de la vivo. Ne ĉiun detalon de ĉiu nacia historio li bezonas rakonti al

ni por atingi sian celon. Tiel li ripetos sin mem. Li devas elekti kaj nur priskribi la vojon de mondregantaj kulturoj, sufiĉe detale por elĉerpi la legaron de l' historia evoluo. En du vortajoj li koncentras sian percepton: Politiko estas la ideo regi la historion laŭ homa volo por homa beno. Kaj. La tuta evoluo estas adaptado al neceso; nia tuta idealismo, nia tuta korpa kaj spirita kreado estas nur cedado antaŭ necesoj.

La historian evoluon li dividas en tri epokojn, kiujn li karakterizas: Tempo de Dioj, Tempo de Dio, Tempo de Scio, kaj komencas sian rakonton per enkonduka parto: Ĉelo al ŝtatulo. En tiu li priskribas la prahistoriaj tempoj skizoj kaj almontras la faktorojn kiuj evoluis la homaron, precipe en la interesa ĉapitro Fatalo. Tiuj faktoroj estas: Laboro kaj Ripozo, Posedo kaj Prospero, Organizo kaj Lernado, Ŝtatiĝo kaj Leĝado, Religio kaj Scienco.

La historio pri la ŝtatoj komencas per Babilono kun Kojnskribo, Leĝoj kaj artoj. Poste venas laŭ la rakonto de Biblio Palestino kaj Egiptujo en tre bela poeziplena lingvo. La Helenoj naskigas Politikon, Filozofion kaj Konstitucion, la Romanoj la konceptojn Patricioj, Plebanoj, Proletoj kaj Imperio. Sur la sojlo al la dua epoko renkontas nin Helenismo, Kristanismo kaj Eklezio. La unua libro kondukas nin nur paŝon en tiun duan epokon: tuŝas la aperon de novaj gentoj de la Nordo, la migradon de multaj gentoj, la naskiĝon de la Mahometanoj kaj diras la devizon de la Mezepoko: Imperiestro kontraŭ Papo.

Kiel vi vidas treege interesa libro, ne seka faktaro nur, sed idearo pensiga pri temo ĉiam interesa: la vivado de la homaro. Se vi ne konsentas kun la aŭtoro pri ĉio, vi tamen lernos per la legado: vi riĉigas vian menson kaj vian lingvon. Aĉetante la libron, vi ankaŭ kuraĝigas Heroldon al plua irado sur tiu por nia lingvo tre grava vojo: eldonado de diversaj sciencaj libroj.

SJn.

Anstataŭ edzino. De Erica Maxwell. Traduko el la angla originalo ("A Wife by Proxy") de M. Sampson. 212 paĝoj. Prezo broŝ. gmk. 3.20, bind. gmk. 4.80. Eldonejo "Heroldo de Esperanto", Brüsseler Str. 94, Köln, Germanujo.

Tre interesa. Bona lingvo, flua stilo. En la romano la linvo Esperanto okupas gravan lokon kiel interkomprenilo inter la ĉefpersonoj.

Esperantista ŝirkalendaro por la jaro 1931. Kun semajnfolioj, diversaj informoj, loko por notoj ktp. Formato de la tuta kalendaro 23×32 cm, de la semajnfolioj 11×16 cm. Prezo gmk. 1.50. Eldonejo "Heroldo de Esperanto".

Baha'u'llah kaj la Nova Epoko. De Dro J. E. Esslemont. El la angla originalo tradukita de Lidja Zamenhof. 191 paĝoj. Prezo mgk. 4.—. Eldonejo "La Nova Tago", Weinheim, Germanujo. Ĉefdeponejo "Heroldo de Esperanto", Köln.

Ĉe doktoro. De ŝalom-Alejhem. El la hebrea lingvo esperantigita de Josef Rabinovic-Tajc. 24 paĝoj. Prezo: broŝ. gmk. 0.25. Havebla ĉe "Heroldo de Esperanto", Köln.

Patroj. El la antikva hebrea literaturo "Miŝna'o" antaŭ 2000 jaroj. Jerusalemo, Erec-Izrael, Palestina. 30 paĝoj. Prezo ne montrita.

Poemo de l' plugisto. Originale verkita de Ĥ. M. Ĥrima. Sennacieca Asocio Tutmonda. Eldona Fako Kooperativa, Leipzig. 64 p. Prezo 0.50 mkg. — Revoluciaj poemoj, laŭforme belaj kaj parte eĉ ĝueblaj, ne sen literatura valoro.

Sonoj novaj kaj malnovaj. Originalaj versoj de Herbert Hesse. 1930, propra eldono de la aŭtoro, ĉefdeponejo Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo. 24 paĝoj. Prezo ne montrita.

Mnemonika Instituto. De prof. D. Fajnŝtein. Laŭ memorfortiga metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio. Vilno (Pollando) Zawalna No 15.11. Prospekto enhavanta programon de la memorfortiga kurso, provojn, atestojn kaj kondiĉojn. Interesitaj petu la senpagan prosp. ĉe la Instituto.

Foiro de Paris 9—25 majo 1931. 8—paĝa prospekto, senpage ricevebla ĉe: Foiro de Paris, 23, Rue N.-D.-des-Victoires, Paris (2e).

Kristanismo kaj patriotismo. De L. N. Tolstoj, tradukis I. Maĉernis. Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa, Leipzig. 112 p. Prezo 1.20 mkg.— Traduko al Esperanto, kun akra kritiko kontraŭ la troiga patriotismo de la fama verkisto.

5.000.000. De S. Grenkamp-Kornfeld. Eldonejo "Esperantista Voĉo", Jaslo (Pollando). 114 p. Prezo fr. sv. 3.—.

Multfoje oni estas en tia animstato ke oni bezonas ian legaĵon, kia ne tro-laborigas la cerbon, oni alivorte bezonas nur distrigon. Por tia stato mi rekomendas "5.000.000"n. Ĝi enhavas noveletojn kaj skizojn diversspecajn certe ne pretendante enhavi profundajojn, nur donitajn por distrado. BEn.

Literatura Mondo, la longe atendata literaturo revuo, fine aperis kun n-roj 1 kaj 2. Interesaj numeroj el ĉiuj flankoj. La ĉefredaktoroj Baghy kaj Kalocsay garantias al la legantoj same bonajn numerojn en la daŭro. Se vere vin interesas modelan literaturajon, petu provekzempleron ĉe: Bleier Vilmos, Budapest IX, Boraros-tér 6.



Fervojistoj atentu!

Kunlaborantoj al fervojteknika gazeto serĉataj.

Por la nova germanlingva fakgazeto teknika "Rad und Schiene" (Rado kaj Relo) oni serĉas spertajn kaj kapablajn kunlaborantojn el la tutmonda fervojistaro. La redakcio bezonas artikolojn, informojn kaj fotografajojn pri ĉiuj gravaj fervojteknikaj novaĵoj, ekz. novkonstruoj de fervojlokomotivoj kaj vagonoj; novaj labormetodoj en fervojaj riparejoj kaj laborejoj ĉiuspecaj; novaj konstruformoj de relvojoj kaj ties zorgado kaj konservado; karakterizaj pontoj, stacidomoj kaj aliaj altkonstruaĵoj; signal- kaj sekurecinstalaĵoj fervojaj; okazintaj fervojkatastrofoj kaj laborakcidentoj; ĉiuj ceteraj teknikaj progresoj ĉe la fervojoj tutmondaj. Precipe dezirataj estas alsendoj de Usono, Francujo, Skandinavio, Japanujo, Sovetujo, Italujo ktp. Amplekso de la manuskriptoj maksimume tri foliojn en Esperanto unuflanke laŭeble per maŝino dualinie skribitajn. Definitive akceptitaj manuskriptoj kaj fotografajoj estas **b o n e h o n o r a r i a t a j**. Ni preferas originalajn artikolojn. La represrajto de la artikoloj kaj fotografajoj devus esti garantiata. Ĉiujn sendajojn oni adresu jene: Al la Redakcio der Zeitschrift "Rad und Schiene", Berlin W 50, Rankestrasse 4, Deutschland.

Anoncoj pri la koresponda kurso.

Esperanto-grupo en Eskilstuna je sia kosto enpresis anoncon pri la perkoresponda kurso en la tri ĵurnaloj de Eskilstuna kaj samtempe enpresigis artikoleon.

Ankaŭ en Gotlands-Posten ni vidis anoncon.

Ni povis konstati la efikon de la nomitaj kaj aliaj anoncoj, kaj ni esperas ke la samideanoj en aliaj lokoj sekvas la ekzemplon kaj enpresigos anoncojn pri la kurso en la lokaj ĵurnaloj, fakaj gazetoj ktp.

Ni prezentas ĉi sube proponon pri nova anonco eĉ pli malgranda ol la antaŭaj, kaj sekve ankaŭ malpli multekosta:

Esperanto lernu Ni Eder på bråkdelen av den tid som behövs för att lära sig engelska, tyska eller franska. En korrespondenskurs om 6 lekt. jämte tre böcker för endast 1 kr. Svenska Esperanto-Förbundet, Stockholm 1. Postgiro 2012. (Även frimärken mottagas.)

För föreläsningföreningar att beakta!

I Folkbildningsförbundets föreläsningkatalog 1931—1932 finnas upptagna följande föreläsningar, som böra uppmärksammas av våra vänner inom föreläsningföreningarna:

Folkskoll. Ernfrid Malmgren: Världshjälpspråket Esperanto.

Fil. mag. Carl Ohlsson: L. L. Zamenhof, det internationella hjälpspråkets upphovsman.

Biciklantoj.

Kie troviĝas sveda esperanta junulo, kiu volas min akompani al Germanujo dum semajnlonga bicikloveturado kunhavante tendon?

En junio aŭ julio.

Carl Lindgren, WANAS, Svedujo...

S. E. F:s Propagandafond.

Ella Nilson, Sölvesborg 10.—

Korespondado.

S-ro N. G. Ŝegolev, Nikitinska str. 169, Barnaul, Sibirio, U.S.S.R., deziras korespondi kun gesamideanoj en Svedujo.

ESPERANTISTOJ!

Havigu la
JUBILEAN GAZETON
DE KLUBO ESPERANTISTA
DE MALMÖ

eldonita okaze de la 25-jarfesto.
Prezo: 25 oeroj kun afranko, 10 ekz. kr. 2.—. Mendu adresante:

Malmö Esperantoförening
Malmö.

KALLELSE

till klubbmöte sker bäst och effektivast genom kort.

KALLELSEKORT, med propagandatext å adressidan, tillhandahålles S. Ö. V:s läns distrikt av SEF. Pris 1.50 pr 100 st. Tillskriv

FRITHIOF HEDBERG
Eskilstuna.

Lösnummer av

Literatura Mondo

— den litterära esperantorevyn —

70 öre pr ex.

FÖRLAGSFÖRENINGEN

ESPERANTO

Box 698, Stockholm 1.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

1930 års Prislista från Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. — Postgirokonto Nr 578

Order överstigande 10 kr. försändas portofritt. Vid insändande av förskottslikvid för mindre order bifogas 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

Läroböcker, Ordböcker m.m.

Esperanto utan förkunskaper

av Harald Skog, bearb. av Sam. Jansson. Enkel, grundlig o. innehållsrik. 0:50.

Lärobok i Esperanto

av P. Nylén. 8 uppl. Mycket spridd och omtyckt, särskilt lämplig för dem, som äga språkunderbyggnad. 1:—.

Praktisk lärobok i Esperanto

för kurser och självstudium. Övers. fr. engelska av S. O. Jansson. Omväxlande, intressant och rik på förklarande exempel. 2:a upplagan. 2:—.

Kurs i Esperanto

för självstudium och studiecirklar av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. 0:90.

D:o, del II. Läsebok. 0:90.

Lärobok i Esperanto

för A.B.F. och andra studiecirklar av Jan Massiak. Inb. 2:50.
Kommentarer till d:o. 1:—.

Esperanto-Kurso

av V. Setälä. En enkel och trevlig läro- och läsebok med översättning av texten till svenska. Illustrerad. 0:50.

Lärobok i Esperanto

av Carl Ohlsson. Grammatik uppställd efter satsdelarna. Innehåller på samma gång en svensk satslära. 3:—.

Esperanto-Grammatik

av Läroverksadjunkt Nils Nordlund. 1:50.

Nyckel till Esperanto (7:e uppl.)

En miniatyrlärobok på 36 sid. med ordlista. Utmärkt för propaganda. 0:10.

Esperanto-svensk ordbok

av G. H. Backman. Den utförligaste vi äga. 3:—. D:o inb. 4:—.

Svensk-esperantisk ordbok

av G. H. Backman. Oumbärlig för envar som skall skriva esperanto. 4:—. D:o inb. 5:—.

Dubbel fickordbok i Esperanto

av Carl Ohlsson. Svensk-esperantisk och esperantisk-svensk ordbok. 192 sid. 1:50.

Esperanto-Parlör

av N. Nordlund. 1:—

Fundamenta Krestomatio

av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken, avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25.

En bok som varje esperantist bör äga och grundligt studera.

Fundamento de Esperanto

av D:r L. L. Zamenhof. Grammatik, övningsstycken och ordförteckn. på franska, engelska, tyska, ryska och polska språken. 1:75

Lingvaj Respondoj

av D:r L. L. Zamenhof. Esperantos skapare giver här utmärkta svar på språkliga frågor. Rekommenderas. 1:50

Nameso.

Läsebok för nybörjare i Esperanto. Med jämnlöpande svensk och esperantisk text. 0:40.

Unua legolibro

av Kabe. Den mest kända och spridda läseboken. 1:50

La insulo de feliĉuloj

(De lycksaligas ö) av Aug. Strindberg. 1:50

Svenska Esperanto-Förbundets Fortsättningskurs.

6 lektioner. 5:—.

Propaganda.

Tio sanningar om Esperanto.

Flygblad. Pr 100 ex. 2:—

Vad är Esperanto?

Flygblad. 100 ex. 1:—

Brevkort

med svensk propagandatext. 10 st. 0:40, 100 st. 3:—

D:o med esperantos grammatik.

10 st. 0:40, 100 st. 3:—

Esperantostjärnor

1. Femuddig grön stjärna med inskript. »Esperanto», nål, 0:75

2. Vanlig femuddig grön stjärna, nål, 0:60

3. D:o, d:o brosch, 0:60

4. Miniatyrstjärna, nål, 0:40

5. U. E. A.-stjärnor (endast för medlemmar av U.E.A.) nål ell. knapp. 1:25

Mondhistorio en Esperanto!

Originale verkita de
Hermann Haefker

"Jarmiloj pasas"

estas la titolo de nova, grava verko eldonita de Heroldo de Esperanto. Ĝi estas vere supernacia, superkonfesia kaj superpartia. Nenia seka denombrado kaj priskribado de okazaĵoj, sed profundaj pensoj, komparado kaj verserĉado.

La tuta verko ampleksos du volumojn.

La unua volumo jam estas preta.

Prezo, duonlede bindita, presita sur bona, senligna papero,
unu vol. kr. 8:25.

Mendu tuj tiun valoran libron!

August Strindberg:


La konscienco riprocas

(Svede: Samvetskval.)

Tradukita de **G. H. Backman.**

Prezo 1 kr.

Ni transprenis la tutan eldonon de tiu libro — bela perlo de la sveda literaturo. — Havigu al vi tiun verkon de nia plej granda verkisto.



1,300 Andrée-böcker sålda!

Andrée-boken på esperanto — Per balono al la poluso — har blivit en av de största framgångarna i esperantolitteraturens historia. Esperantopressen har skänkt den enstämmiga lovord. Se uttalandena i förra numret!

Ej fullt en tredjedel av upplagan återstår.

Andrée-boken på Esperanto blir i framtiden en eftersökt klenod. Köp den, läs den och bevara den väl!

Pris häft. kr. 9:—, inb. i starkt klotband kr. 11:50.

Fritz Lindén:

Kurs i Esperanto. Del II.

Läsövningar m. m.

Kan användas även av dem, som icke genomgått första delen.

Pris 90 öre.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

STOCKHOLM 1. — Box 698. — Postgirokonto 578.

Prislista på begäran gratis och franko.